# La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William Peace

lundon, la 9an de Julio, 2018 • numero sep


## Hodiaŭ

- ★ **7:15 atm:** Matenmanĝo
- ★ **8:30 – 12:00 ptm:** Lecionoj (Alexander, Kováts, Löwenstein)
- ★ **8:30 – 12:00 ptm:** **KER-ekzamenoj: aŭskultaj partoj** (vidu pli detalan horaron en paĝo 2) *Flowe (ĉambro "Siberio")*
- ★ **12:15 ptm:** Tagmanĝo
- ★ **2:00 – 3:30 ptm:** Ekzercado kun Katalin
- ★ **2:00 – 5:00 ptm:** Lecionoj (Vergara)
- ★ **2:00 – 5:00 ptm: KER-ekzamenoj: parola parto** *Flowe (ĉambro "Siberio") skajpe*
- ★ **5:30 ptm:** Vespermanĝo
- ★ **6:15 – 6:55 ptm:** Annika NEUDECKER kaj Margo KEVESS-COHEN parolos pri **"Duolingo Events"** *Flowe (klasĉambro de Anna)*
- ★ **7:00 – 8:00 ptm:** **Tempo Kun Tomaso:** Tomaso filmos konversaciojn kun aliaj Esperantistoj por speciala serio de filmetoj en sia YouTube-kanalo, "Esperanto Variety Show." *Flowe 110*
- ★ **8:00 ptm:**
  - Anna LÖWENSTEIN prelegos pri **"La imperiestro, kiu naskiĝis en Zamenhof-tago"** (vidu pli da informo en paĝo 2) *Flowe (klasĉambro de Anna)*

    – kaj –
  - **Fina provludo por la distra vespero**
- ★ **9:30 ptm:** Gufujo

# Finvenkismo, Raŭmismo, Plivastismo, kaj…?

*de Simmon (Simono) BARNEY (English version follows)*

En la altnivela kurso hieraŭ posttagmeze, ni diskutis kelkajn filozofiojn en Esperantujo. *Finvenkismo* temas pri la movado atingi la la tiel nomatan "fina venko", kiam la tuta mondo parolos Esperanton kiel duan lingvon. *Raŭmismo* aperis en la Manifesto de Raŭmo kaj asertas, ke Esperanto jam havas komunumon validan, do kial oni ne fajfu pri varbado? José Antonio prezentis trian perspektivon, kiun li nomis *Plivastismo*, en kiu li asertis ke homoj ne provu varbi iun ajn homon, sed specife tiujn, kiuj vere similas al la varbanto mem. Mi ne kontraŭstaras tiun metodon. Tamen, laŭ mia sperto, ankaŭ ekzistas plia filozofio. Ĝis nun mi ne aŭdis nomon por ĝi, sed mi emas nomi ĝin *Kulturismo*.

Ĉu vi konas homojn, kiuj lernas la japanan pro animeo? Ĉu vi konas homojn kiuj lernas la elfan pro *La Majstro de l' Ringoj*? Nu, tiaj aferoj okazas ankaŭ rilate al Esperanto. Pasintsemajne ni diskutis Esperantiston kiu trovis Esperanton pro koncerto de Kore (tre pasia Esperantista kantisto). Mi persone konas Esperantiston, kiu trovis Esperanton per la filmo *Incubus*. Ni ja povas allogi homojn al nia komunumo sen varbi iun ajn. Ni nur devas kultivi nian kulturon en maniero, kiun oni povas sperti de ekstere – aparte per muziko, filmoj, plurlingvaj libroj, ktp. Tio estas la kerna ideo de Kulturismo. Per tiu metodo, ni ne nur plibeligas nian komunumon per pli da arto, sed ni ankaŭ ebligas la disvastigadon de Esperanto al tiuj, kiujn ĝi povus interesi.

The the upper-level afternoon class, we discussed a few philosophies of Esperantoland. *Fin-venk-ism-o* is about the movement that aims for the so-called "final conquest", when the who world would speak Esperanto as a second language. *Raŭm-ism-o* appeared in the Manifest of Rauma and asserts that Esperanto already has a valid community, so why bother with recruitment? José Antonio presented a third perspective, which he called *Pli-vast-ism-o,* in which he asserted that people shouldn't try to recruit just anyone, but specifically those similar to yourself. I'm not against that approach. However, in my experience, there's an additional philosophy. I haven't heard a name for it just yet, but I'm inclined to call it *Kultur-ism-o*.

Do you know people who are learning Japanese because of anime? Do you know people learning Elvish because of *The Lord of the Rings*? Well, that sort of thing happens with Esperanto, too. Last week, we discussed an Esperantist who found Esperanto through a concert of Kore (a very passionate Esperanto singer). I personally know an Esperantist who found Esperanto via the film *Incubus*. We really can entice people into our community without advertising anything. We just have to cultivate our culture in a way that they can experience from outside -- particularly with music, film, multilingual books, etc. That is the main point of Kulturismo. With this method, we not only embellish our own community with more art, but we also enable the dissemination of Esperanto to those who might find it interesting.

# Pri Lira Asocio de Nord-Ameriko

*de Ŝila DEVLIN*

Ĉu vi iam aŭdis pri bela instrumento kiu nomiĝas liro? Ĝi havas sian modernan fonton en la filozofiaj ideoj de Rudolf Steiner. Du artistoj desegnis la bazan strukturon de la moderna liro ĉar ili volis ke personoj kiuj havas defiojn aŭ fizikajn aŭ mensajn, povu krei belan muzikon sen la malfacilaĵo de longaj jaroj de studado. La rezulto estis ke movado komenciĝis kaj pli da artistoj nuntempe konstruas lirojn kiujn ili mem elpensis. Hodiaŭ ĉiuj povas ludi liron per la helpo de Lira Asocio de Nord-Amerika (LANA). Se vi vizitos la lernejojn nomatajn *Waldorf*, vi vidos ke multaj infanoj ekzercas pri lirludon.

Antaŭ kelkaj jaroj, la Usona Landa Kongreso (LK) okazis en Detrojto (Detroit). Tiujare la LANA kunveno okazis tie preskaŭ samtempe kaj mi elektis ĉeesti la liran eventon. Estis tie proksimume cent liristoj kiuj venis de Nov-Zelando, Brazilo, Japanujo, Ĉinio, Irlando kaj multaj Eŭropaj landoj. La tuta liristaro ofertis orkestran prezentaĵon por la publiko. Ni estis cent-lira orkestro. Estas ĝojo por mi esti ano de du organizaĵoj - unu lingva, la alia muzika - kiuj ambaŭ plifaciligas la komunikadon de homoj tra la mondo.

Serĉu rete por informo pri LANA (*Lyre Association of North America*). Se vi volas, vi povas lupreni de ili liron, kaj trovi instruiston.

# Diru al ni!

*de Esperanto-USA*

Esperanto-USA volas aŭdi pri viaj esperoj, projektoj, kaj ideoj pri Esperanto.

Diru al ni ĉe https://goo.gl/forms/YP9LF2aRHSZnXaNC2 aŭ uzu la skaneblan kodon.

# Solvoj:Kiu havas la zebron? Kaj kiu trinkas plej volonte akvon?

*el la LERNILOTEKO de edukado.net*
*de Katalin KOVÁTS*


| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 |
|---|---|---|---|---|---|
| **Revuo** | *Esperanto* | *Kontakto* | *Monato* | *El Popola Ĉinio* | *IPR* |
| **Nacieco** | norvego | ruso | anglo | japano | hispano |
| **Dombesto** | kato | ĉevalo | abeloj |  | hundo |
| **Trinkaĵo** | akvo | teo | lakto | kafo | pomsuko |
| **Koloro** | flava | blua | ruĝa | verda | blanka |

# KER-ekzamemoj: aŭskulta parto okazos hodiaŭ

- 9:00 – 9:50 atm: nivelo C1
- 10:00 – 10:45 atm: nivelo B2
- 11:00 – 11:40 atm: nivelo B1

Ĉiuj aŭskultaj ekzamenoj okazos en la ĉambro "Siberio" en *Flowe*.

La parola parto por ĉiu ekzamenoto okazos individue hodiaŭ kaj morgaŭ. Konfirmu vian horon kun Katalin.
La skriba parto por ĉiuj niveloj okazos morgaŭ.



*Jen la rezulto de lastatempa ludo de Skrablo ĉe NASK. Foto de Jarlo BILLS*